

« Unua kontakto »

La NRO « Scio Sen Bariloj » uzas jenan programon kaj obtenis aprobon pri ĝi de Internacia Ekzamena Komisiono (IEK).

2013-01-01 Regularo pri ekzameno nomita « Unua Kontakto »

10hora kurso.

Aldone 5 horoj da memstara studado en ĉeesto de la instruisto.

ENHAVO de la KURSO

Sciendaĵoj por la ekzameno

1) Salutado

Saluton !

Kiel vi fartas ?

Mi fartas bone, dankon !

Kiu vi estas ?

Mi estas Karlo = Mia nomo estas Karlo.

Kie vi loĝas ?

Mi loĝas en Kotonuo.

Jes / ne

Ĝis revido !

2) Alfabeto

Laŭ « poŝamiko » paĝo 42.

3) -o

La urbo

La lando

La suno

La luno

La homo

La besto

La arbo

La objekto

4) -a

Bela

Bona

Rapida

Malbela

Malbona

Malrapida

5) -i

Mi volas dormi.

Mi devas iri.

Mi volas manĝi.

Mi devas trinki.

Mi volas studi.

6) -e

Mi legas rapide.

Mi studas diligente.

Mi dormas bone.

Mi parolas esperante.

Mi skribas bele.

7) -u

Parolu !

Iru !

Venu !

Silentu !

Legu !

Ripetu !

8) -n

Mi manĝas rizon.

Mi trinkas lakton kaj akvon.

Fraton mi havas.

Esperanton parolas mi.

Mi ne havas tempon.

9) -o estas -a mal-

La lando estas bela.
La temperaturo estas alta.
La lingvo estas facila.
Afriko estas granda.
Svislando ne estas granda.
Svislando estas malgranda.
Kongo estas granda.
Benino estas malgranda.

10) -in-

Mi havas fratinton.
Mi ne havas kuzinton.
Elefantino estas besto.
Jaguarino estas besto.
Ĝirafino estas besto.

11) La nombroj ĝis 20 plus 100 kaj 1000

12) Kulturaj konoj : sciendaĵoj

Kreinto : Zamenhof
Aperojaro : 1887
Deveno de Zamenhof : Pollando-Ruslando
UNESCO aprobis du rezoluciojn favorajn al Esperanto
Centra Oficejo de UEA : Roterdamo, Nederlando.
2013 : proks 2-3 milionoj da parolantoj, parolantoj en pli ol 120 landoj, 70 landaj asocioj ĉe UEA, 175 000 artikoloj ĉe wikipedia.

RIMARKO

Fakto estas, ke por internaciaj ekzamenoj la kandidatoj devas foje vojaĝi foren. Do devas ekzisti eblo ricevi atestilon sen fora vojaĝo.

Pro organizaj kialoj tiaj ekzamenoj devus esti enlandaj aŭ regionaj. Iu instanco povas starigi ilin post informo al IEK kaj al

Landa Asocio de la koncerna lando. Devas esti poste raporto al tiuj du instancoj.

Dua aspekto : tiuj ekzamenoj estas parte pere de traduko el la nacia ĉeflingvo aŭ al la nacia ĉeflingvo.

EKZAMENO

Skriba parto :

Diktaĵo kun ĉiuj sonoj de la lingvo en nekonataj vortoj (30 p.)

Kulturaj konoj. (5 demandoj) (14 p.)

Traduko al EO de frazetoj lernitaj. (5 frazoj) (20 p.)

Demandoj kun 3 elekteblaj respondoj (8 demandoj) (16 p.)

Inventado de 5 frazoj en Eo (20 p.)

Parola parto :

Legado kun ĉiuj literoj de la lingvo en nekonataj vortoj (20 p.)

Maksimumo : 120 p. Sukceslimo : 60% = 72 p.

En kazo de granda grupo, oni povas fari la teston sen parola parto. Tiam la maksimumo estas 100 p. kaj la sukceslimo 60 %.

Loka Ekzamena Komisiono :

Unu membro de IRE kaj dua persono : instruisto de esperanto.

Atestilo

Kun mencio : ... sekvis 10horan kurson kaj sukcesis en la fina testo « Unua kontakto ». 72 - 90 : KONTENTIGE. 91 - 105 : BONE. 106 - 120 : TRE BONE.

**Sen parola parto : 60 - 75 : KONTENTIGE. 76 - 90 : BONE. 91
- 100 : TRE BONE.**

**Regularo aprobita de Internacia Ekzamena Komisiono IEK elektita
de UEA Komitato kaj de ILEI Komitato.**

**Dakaro
2013-01-01**